

Espero Katolika



Numero 10-12/2014

Oktobro-December 2014



Sur la kovrilo: *Historia kaj kortuŝa ĉirkaŭbrako inter Papo Francisko kaj la ortodoksa Patriarko de Konstantinopolo, Bartolomeo (v. p. 69).*

ENHAVO

LA PAPA "PEPADO" DUJARIGIS

La papaj mesaĝoj pere de Tüitero 63

FRANCISKO ĈE LA EŬROPAJ INSTITUCIOJ

Resumo de liaj paroladoj ĉe la Eŭropa Parlamento... 64

... kaj ĉe la Konsilio de Eŭropo 65

DU GRANDAJ EVENTOJ POR LA UNIVERSALA EKLEZIO

La fermo de la Sinodo kaj la beatproklamo de Paŭlo la 6-a 66

PAŬLO LA SESA KAJ ESPERANTO 67

LA PATRINO VIRGA 68

LA PAPO PRI SIA VOJAĜO AL TURKIO 69

PREĜO AL SANKTA PIO LA 10-a 70

KRISTNASKA MESAĜO 2014 DE LA PAPO

La infanoj, viktimoj de la nunepokaj Herodoj 71

SANKTA NOKT', SILENTA NOKT' 73

LA HISTORIO DE MALFELIĈA PRINCINO EN RELIGIA PENTRAĴO 74

LA "CIVILA" MONTARA SAVANTO 75

KARDINALO JAM 20 JAROJN 77

«JES, VIRĜINJA, PAĈJO KRISTNASKO EKZISTAS» 78

ARMANDO ZECCHIN FURORAS EN WIKIPEDIO 80

Centra Oficejo de IKUE: Via di Porta Fabbrica 15, I-00165 ROMA RM, Italio

Telefono kaj fakso: +39-06.39.63.81.29 - Elektronika poŝto: <ikue@ikue.org>

TTT-paĝoj: <http://www.ikue.org> - <http://www.esperokatolika.org> * Dissendolisto: <ikue@yahoo.com>

UEA-konto "ikue-v" * Banko: "Unione internazionale cattolica esperantista" Roma, Italio

IBAN IT34H0760103200000023290000 - BIC/SWIFT: BPPITRRXXX

Registriĝo ĉe la tribunalo de Romo - Registrazione presso il Tribunale di Roma

n. 17138, 11-2-1978

Gratis agli Associati

Presejo - Tipografia

ROTASTAMPA s.a.s. - Via G. Mirri 21, 00159 ROMA RM, tel. +39-06.43.80.051

Respondeca Direktoro - Direttore responsabile

Antonio DE SALVO, Via Aldebaran 13, Parco Azzurro, I-00010 GUIDONIA RM, Italio
tel. (vespere) +39-07.74.36.36.03 E-poŝto: <antoniodesalvo@tiscali.it>

Espero Katolika, revuo fondita en 1903, estas oficiala organo de I.K.U.E.

INTERNACIA KATOLIKA UNUIĜO ESPERANTISTA internacia asocio de fideluloj fondita en 1910, agnoskita laŭ pontifika juro per Dekreto n. 196/92/S-61/B-25 de 11.2.1992 de la PAPA KONSILIO POR LAIKOJ. **Spirita Konsilanto:** frato Pierluigi Svaldi - **Prezidanto:** Giovanni Daminielli - **Vic-Prezidantino:** Marija Beloŝević - **Vic-Prezidanto:** Miloslav Šváček - **Ĝenerala Sekretario/Kasisto, direktoro de la C.O.:** Carlo Sarandrea - **Estrarano por ekumenaj rilatoj:** Stefan Lepping. **Kontorevizoroj:** Norma Cescotti Covelli, Tiziana Fossati, Krzysztof Tomczak.

LA PAPA “PEPADO” DUJARIĜIS

La 12-a de Decembro estis la dua datreveno de la malfermo de konto @pontifex, ĉe Tŭitero (*ankaŭ: Tvitero*), unu el la pli popularaj socia-retaj servoj, kiu ebligas al uzantoj sendi tekstmesaĝojn (aŭ angle: tweets – “pepaĵoj”) el maksimume 140 signoj.

“Posedata” de du Papoj – la unua mesaĝeto kun 140 karakteroj estis tiu de Benedikto la 16-a, kiu ĝin publikigis per tabulkomputilo – nun la konto kreskadas rapide ĝis la nombro de 17 milionoj da sekvantoj aŭ legantoj (la personoj, kiuj “sekvas” ĝin kaj ricevas ĉiun novan mesaĝon). La konto estas je dispono en 8 lingvoj kaj Papo Francisko pruvis, ke li estas ĝia saĝa uzanto. Bergoglio fakte preskaŭ ĉiutage “pepas”, ofte relanĉante penson de la matena prediko en Domo Sankta Marta en Vatikano, invitante al preĝado aŭ memorigante aparte amatan liturgian solenon. Okazis ankaŭ, ke la Papo aliĝis pere de tiu ĉi socia-reta servo al internaciaj kampanjoj, kiel tiu favore al la niĝeriaj studentinoj forkaptitaj de ribela movado Boko Haram (*#BringBackOurGirls*), aŭ ke li esprimis simplajn pensojn de ĉiutaga vivo (“Foje oni vivas sen koni la najbarojn, tio ĉi ne estas kristana vivo”, la 14-an de Septembro 2014). Plejparto el liaj 455 mesaĝetoj (statistiko ĝis la datrevena tago, la 12-an de Decembro) estas invitoj al medito, neniam banalaj perloj de saĝeco, “pensetoj”, kiujn oni povas konsideri plurfoje dum la tago.

La rimedo – “ĝi estas socia retejo por knabetoj”, oni diris – estigis skeptikecon ĉe multaj, kiuj tamen devis ŝanĝi opinion. Al la unuaj 7 diverslingvaj kontoj – angla, araba, franca, germana, hispana, itala kaj portugala – sekvis tiu en la latina, inaŭgurita la 17-an de Januaro 2013 kaj kiu baldaŭ kolektis pli ol 300.000 sekvantojn.

Por la kroniko (aŭ verŝajne por la historio), la unua mesaĝo de Benedikto deman-



Papo Benedikto dum la alsendo de lia unua tŭitera mesaĝo

dis: “Kiel ni povas pli bone vivi la Jaron de la Kredo en nia ĉiutageco?”, dum la dua tekstis: “Dialogu kun Jesuo en la preĝado, aŭskultu Jesuon, kiu parolas al vi en la Evangelio, renkontu Jesuon ĉeestantan en la bezonanto”. Dum 76 tagoj – de la 12-a de Decembro



La tŭitera konto de Papo Francisko en la latina lingvo



2012 ĝis la 28-a de Februaro 2013, komenco tago de la vakanta Seĝo – Ratzinger atingis 3 milionojn da sekvantoj.

Ekde la 17-a de Marto 2013, komenco de la papado de Jorge Mario Bergoglio, ĝis la dua datrevena tago de la konto, Papo Francisko aldonis pliajn 14 milionojn da sekvantoj. Lia unua mesaĝo estis: “Karaj amikoj mi kore dankas vin kaj mi petas al vi daŭre preĝi por mi. Papo Francisko”.

FRANCISKO ĈE LA EŬROPAJ INSTITUCIOJ

La 25-an de Novembro Francisko faris la plej mallongan vojaĝon de Papo: kvar horojn en aviadilo (inter iro kaj reveno) kaj kvar horojn en Strasburgo, dividitajn en du rendezuoj tre engaĝigaj: la vizito al la Eŭropa Parlamento kaj tiu al la Konsilio de Eŭropo (la tiel nomata Eŭropo de la 47 landoj). Senprecedenca intensa streĉo, kiun la Papo, ŝercante kun la ĵurnalistoj en la aviadilo, difinis: kriza tago.

Al la Parlamento de Strasburgo: Eŭropo remalkovru sian bonan animon



Eŭropo estas familio de popoloj, vokata atenti la malfortecon de la popoloj kaj de la personoj, labori por doni dignon al la homo kiel persono kaj ne kiel ekonomia subjekto. Ili estas kelkaj el la konceptoj, kiujn la Papo eldiris alparolante la Eŭropan Parlamenton en Strasburgo, kie li ĉeestis 26 jarojn post la vizito de sankta Johano Paŭlo la 2-a, ĝis nun la unika Papo, kiu alparolis la parlamenton en 1988. Francisko instigis rifuzi la kulturon de la forapartigo kaj tiun vivo-stilon de riĉabundo jam nun ne plu eltenebla kaj kiu malinteresiĝas aparte pri la pli malriĉaj.

Krome la Papo instigis krei la kondiĉojn por labor-eblecoj, por defendi la familion kaj la naturmedion.

“Ĉe pluraj notiĝas impresoj de laceco, de maljuniĝo, de Eŭropo-avino, ne plu fruktodona kaj vigla”. Al la Eŭropa Parlamento Francisko faris paroladon, kiu denuncis, sed kiu ankaŭ instigis kaj kuraĝigis, la paroladon interrompitan de 13 aplaŭdoj kaj kies ŝlosilo vorto estis “digno”. Li petis al Eŭropo ne limiĝi je nuraj ekonomiaj temoj, je institucioj malproksimaj de la homoj. La grandaj idealoj, kiuj inspiris Eŭropon aspektas kva-zaŭ ili perdis altiran forton favore al la burokrataj teknikismoj de ĝiaj institucioj.

“La homon oni ne povas kompari kun simpla mekanismo, kiun oni pritraktas kiel uzenda varo destinita al konsumado”, substreki la Papo, kiu ankaŭ diris ne al Eŭropo, kiu forgesas la malriĉulojn, ne al Mediteranea Maro, kiu fariĝas granda tombejo por tiuj, kiuj serĉas esperon kaj estonton. Jes al Eŭropo zorgema pri la gejunuloj, pri la mondo de la laboro; estas tempo akceli politikojn por enlaborigo, sed ĉefe necesas redoni dignon al la laboro. Rigardi antaŭen kun espero, por venki ĉiujn timojn, kiujn Eŭropo

kune kun la tuta mondo travivas.

“Eŭropo, kiu remalkovras sian bonan animon povas esti valora orienta punkto por la tuta homaro”, akcentis la Papo, kiu memoriĝis la unuopajn problemojn: laboro, migraĵoj, religiaj persekutoj, sed ankaŭ konkretaj riskoj por la demokratio. Sekvis preciza rekomendo: “Kristanismo ne estas danĝero, mi taksas fundamenta ne nur la havaĵon, kiun kristanismo postlasis en la pasinteco al la soci-kultura formado de la kontinento, sed ĉefe la kontribuon, kiun ĝi volas doni hodiaŭ

Al la Konsilio de Eŭropo: sen radikoj oni mortas, serĉu la veron

Post sia interveno ĉe la Eŭropa Parlamento, Francisko atingis la sidejon de la Konsilio de Eŭropo, institucio starigita en 1949 kun la tasko akceli la demokration kaj la homajn rajtojn en la kontinento. La Papo lanĉis defion al la parlamenta asembleo de la Konsilio: “Oni remalkovru la radikojn de Eŭropo por konstrui estontecon de paco kaj de dialogo kun la mondo”. Sen radikoj oni mortas, li diris, redeklarante poste la denunccon de la Eklezio kontraŭ la komercado de armiloj kaj de homaj estuloj. Li ankaŭ avertis, ke sen la serĉo de la vero la demokratio glitas en individuismoj kaj oni atingas la globalizadon de indiferentismo.

Parolante pri la paco, Francisko petis “forigi la kulturcon de la konflikto”. Li memoriĝis, ke “bedaŭrinde la paco estas daŭre tro ofte vundita. Ĝi estas tia en multaj mondopartoj, kie furiozas diversaspecaj konfliktoj. Ĝi estas tia ankaŭ ĉi tie en Eŭropo, kie ne ĉesas streĉiĝoj. Kiom da doloro kaj kiom da mortintoj estas ankoraŭ en ĉi tiu kontinento, kiu sopiras al paco kaj tamen refalas facile en la iamajn tentojn!”.

Post firma kondamno de la “religia kaj internacia terorismo”, kiu profunde malŝatas la homan vivon kaj falĉas sendiskriminacie senkulpajn viktimojn, la Papo komparis Eŭropon kun la poplo priskribita de la itala poeto Clemente Rebora (1885-1957) en unu el siaj poemoj. Eŭropo estas kiel tiu poplo, kun la branĉoj etenditaj al la alto, “animata

kaj estonte por ĝia kresko. Tiu kontribuo ne estas danĝero por la laikeco de la ŝtatoj kaj por la sendependeco de la institucioj de la Unio, sed male pliriĉigo”.

Fine la Papo adresis sian kuraĝigon al la eŭropaj parlamentanoj: “Al vi leĝofarantoj apartenas la tasko gardi kaj kreskigi la eŭropan identecon, por ke la civitanoj retrovu konfidon je la institucioj de la Unio kaj je la projekto de paco kaj amikeco, ilia fundamento. Mi instigas vin, sekve, labori, por ke Eŭropo remalkovru sian bonan animon”.



Papo Francisko ĉe la Eŭropa Parlamento

de nesatigebla deziro koni, evolui, progresi, deziro de paco kaj de unueco”. “Ĝi estas elano”, daŭrigis Francisko, kiu fariĝas ebla nur dank’ al la fortikeco de la trunko kaj al la profundeco de la radikoj, kiuj nutras ĝin. Rebora plie rimarkigis, ke ‘la trunko submergiĝas, kie estas pli da vero’. La radikoj nutriĝas per la vero, kiu konsistigas la nutraĵon, la vivodonan limfon de ĉiu ajn socio, kiu volas vere esti libera, humana kaj solidareca. Aliflanke, la vero alvokas al la konscienco, kiun oni ne povas redukti per kondiĉigoj. La konscienco kapablas koni sian dignon kaj malfermiĝi al la absoluto, kreskigante la fundamentajn elektojn bazitajn sur la serĉo de la bono por si kaj por la aliaj; ĝi estas loko de respondeca libero”.

La parolado fronte al la Konsilio de Eŭropo estis la okazo por deziri Eŭropon vere plurisman, en kiu ideologioj lasu spacon al dialogo kaj al la konfrontado por la komuna bono.

DU GRANDAJ EVENTOJ POR LA UNIVERSALA EKLEZIO

La fermo de la Sinodo kaj la beatproklamo de Paŭlo la 6-a

La 19-an de Oktobro Meso celebrita de Papo Francisko en placo Sankta Petro, fronte al 70.000 fideluloj el ĉiuj mondopartoj, kun la ĉeesto de la emerita Papo Benedikto la 16-a, sigelis la fermon de la ekstervica Sinodo de la Episkopoj pri la familio kaj la beatproklamon de Papo Paŭlo la 6-a – Giovanni Battista Montini. “Pro donaco de la Sankta Spirito”, diris Francisko dum sia prediko, “oni laboris en la Sinodo per vera libereco kaj humila kreivo”, por “restarigi la esperon en multaj personoj sen espero”. Sekvis plurfoja danko al Papo Paŭlo la 6-a pro lia paŝtista servado kuraĝa, saĝa kaj longvida.

“Redonu al Cezaro tion, kio apartenas al Cezaro, sed donu al Dio tion, kio apartenas al Dio. Per ĉi tiu frazo ironia kaj genia Jesuo respondis al la provoko de la fariseoj, kiuj, por tiel diri, volis fari al Li ekzamenon pri religio kaj faligi Lin en eraron.” Per ĉi tiuj vortoj inspiritaj de la dimanĉa Evangelio Francisko komencis sian predikon.

“Ĝi estas efekta respondo, kiun la Sinjoro donas al ĉiuj, kiuj starigas al si konscienc-problemojn, ĉefe kiam enludiĝas iliaj avantaĝoj, iliaj riĉaĵoj, ilia prestiĝo, ilia povo kaj ilia famo. Kaj tio ĉi okazas ĉiuepoke, de ĉiam”.

Redoni al Dio tion, kio apartenas al Dio “signifas”, klarigis Francisko, “agnoski kaj konfesi fronte al ĉiu ajn speco de povo, ke nur Dio estas la Sinjoro de la homo, malfermiĝi al lia volo kaj kunlabori en lia Regno de mizerikordo, de amo, de paco, jen la eterna novaĵo ĉiutage remalkovrenda, venkante la timon, kiun ni ofte sentas fronte al la surprizoj de Dio”.

Dio male “ne timas novaĵojn! ... Li igas nin novaj daŭre kaj daŭre Li surprizas nin, malfermante al ni vojojn antaŭe ne pensitajn. En tio kuŝas nia vera forto, la fermentilo, kiu ŝveligas ĝin kaj la salo, kiu donas guston al ĉiu homa klopodo kontraŭ la reganta maloptimismo, kiun la mondo proponas. En tio estas nia espero, ĉar la espero je Dio ne estas sekve fuĝo el la realo, ĝi ne estas alibio, ĝi estas eĉ kuraĝa respondo al la sennombraj novaj defioj”.

“Tiel okazis”, substrekis Francisko, “dum

la ekstervica Sinodo de la Episkopoj, dum kiu paŝtistoj kaj laikoj el la tuta mondo portis al Romo la voĉon de siaj lokaj Eklezioj, por helpi la hodiaŭajn familiojn iri laŭ la vojo de la Evangelio kun la rigardo fikse rigardanta Jesuon”.

“Ĝi estis granda sperto, dum kiu ni travivis la sinodecon kaj la kolegiecon kaj ni sentis la forton de la Sankta Spirito, kiu gvidas kaj renovigas ĉiam la Eklezion, vokatan, sen ŝanceliĝi, priflegi la vundojn, kiuj sangigas kaj restarigi la esperon en multaj personoj sen espero”.

Kaj la Sankta Spirito”, preĝe alvokis la Papo, “kiu ebligis al la Sinodo labori malavare kun vera libereco kaj humila kreivo, ankoraŭ akompanu la iradon, kiu en la Eklezioj de la tuta mondo pretigas la ordinaran Sinodon de la venonta oktobro 2015. Ni semis kaj daŭre semos kun pacienco kaj persistemo, en la certeco, ke la Sinjoro kreskigas tion, kion ni semis”.

Sekvis la omaĝo al Paŭlo la 6-a, beatproklamita dum la Meso, kaj la rememoro pri liaj vortoj, kiam li starigis la Sinodon de la Episkopoj la 15-an de Septembro 1965: “Funde esplorante la signojn de la tempoj, ni klopodas adaptigi la vojojn kaj la metodojn al la kreskintaj bezonoj de niaj tagoj kaj je la ŝanĝintaj kondiĉoj delasocio” (Apostola letero “Apostolica Sollicitudo” – Apostola Zorgo).

Giovanni Battista Montini, “granda Papo, kuraĝa kristano, senlaca apostolo. Fronte al Dio hodiaŭ”, diris Francisko, ni povas nur diri vorton tiom simplan, kiom sinceran kaj

gravan: dankon! Dankon, nia kara kaj amata Papo Paŭlo la 6-a! Dankon pro via humila kaj profeteca atesto de amo al Kristo kaj al lia Eklezio”.

“Granda timonisto” de la dua vatikana Konkilio Paŭlo la 6-a notis en sia taglibro, ke verŝajne la Sinjoro vokis lin al tiu tasko, ne tiom por ke li regu aŭ savu la Eklezion el la malfacilaĵoj tiam ekzistantaj, ĉar tio kon-

cernas Dion, kiom por ke li trasuferu ion por la Eklezio.

“En ĉi tiu humilo rebrilas la grandeco de beata Paŭlo la 6-a”, finis la Papo, “kiu, dum ekaperis sekularizita kaj malfavora socio, li kapablis teni per longvida saĝeco – kaj foje tute sola – la timonon de la ŝipo de Petro sen perdi iam ajn la ĝojon kaj la konfidon je la Sinjoro”.

PAŬLO LA SESA KAJ ESPERANTO

Kiam li estis Kardinalo de Milano, li, kiel Episkopo de la tiama IKUE-Prezidanto sac. Ferdinando Longoni, multfoje kuraĝigis per vortoj kaj rimedoj la Prezidanton.

Post la papa elekto, Paŭlo la 6-a akceptis sac. Longoni kaj aliajn IKUE-estraranojn en privata aŭdienco. La Papo diris interalie: «La Eklezio rigardas favore kaj kuraĝigas la klopodojn, kiuj plibonigas la interkompreniĝon de la popoloj, kaj subtenas la lingvon, kiu faciligas tian interkompreniĝon». (*P. Ferdinando Longoni*)

La 21-an de Aprilo 1966 la Papo persone donis la aprobon por oficiale uzi Esperanton en la Liturgio rilate la legaĵojn kaj la preĝon de la fideluloj okaze de E-kongresoj kaj kunvenoj. Mons-ro Bugnini, sekretario de la Konsilantaro por la plenumo de la Konstitucio pri Sankta Liturgio, tiel skribis (en la itala) al Pastro Giacinto Jacobitti: «Mi havas la plezuron komuniki al vi, ke la Sankta Patro, en la aŭdienco de la 21-a de Aprilo 1966, bonvole rajtigis la Unuiĝon de Katolikaj Esperantistoj uzi okaze de asembleoj, kunvenoj kaj kongresoj Esperanton en la legaĵoj kaj en la preĝo de la fideluloj de la Meso» (*letero n. 1212/66 de la 26-a de Aprilo 1966*). Sekve de ĉi tiu leterpermeso oni daŭrigis kaj pluirigis la uzon de Esperanto en Liturgio, ĝis kiam alvenis la tuta aprobo (*letero n. A 252/68 de 16.7.1968, de Mons. Bugnini, Sekretario de la dirita Konsilantaro*).

Dum la ĝenerala aŭdienco de la 13-a de Aŭgusto 1975 la partoprenintoj en la IKUE-

Kongreso en Romo aŭskultis liajn salutvortojn en placo sankta Petro. Paŭlo la 6-a aludis la ĉeestantajn esperantistojn dufoje. Unue menciante la ĉeestantajn grupojn: «Alia internacia grupo, kiun ni salutis baldaŭ per aparta parolo, estas tiu de la partoprenantoj



en la internacia Kongreso de la katolikaj esperantistoj. Vidu, ili havas la verdan flagon, kiu estas simbolo de espero, ili estas la esperantistoj». Kaj kelkajn minutojn poste Papo Paŭlo la 6-a adresis sian menciitan, apartan saluton: «Ni ne volas fini ĉi tiun parton de la aŭdienco sen adresi nian saluton kaj nian bondeziron al la partoprenantoj en la 36-a internacia kongreso de la katolikaj esperantistoj. Al viaj apartaj kulturaj celoj vi volis aldoni noton delikatege religian, eniĝante en la spiriton de la jubileo kiu al ĉiuj bonvolaj homoj parolas pri renoviĝo, pri konvertiĝo, pri retrovita kontakto kun Dio, kiu amas kaj pardonas. Ĉi tiu spirito gvidu vin en la instigo al frateco kaj interkompreniĝo inter la diversaj popoloj el malsamaj lingvoj, kiujn

vi klopodas favori laŭ la programo, kiu vin distingas. Tio estas nia sincera bondeziro, kiun ni plivalorigas per nia apostola beno, favoranta la donacojn de la Sinjoro».

Dum la papado de Paŭlo la 6-a, Radio Vatikana komencis regule elsendi en Esperanto.

Lia lasta persona iniciato estis la permeso

celebri en Esperanto dum la 37-a IKUE-Kongreso (1977) en Ĉenstoĥovo, malgraŭ la haltigo de la uzo de Esperanto en Liturgio fare de la Vatikana Kongregacio pri Sakramentoj kaj Dia Kulto. Tiun Meson devis celebri, sed lastmomente li estis malebligita, kard. Karol Wojtyła, poste Papo Johano Paŭlo la 2-a.

LA PATRINO VIRGA

La nuntempa mondo vokas pri sendifekteco. Kiu el ni aĉetus difektitan produktaĵon? Kiu el ni kuraĝus eniri en la difektitan trafikilon? La sendifekteco de kio ajn estas la marko de la kvalito. Malo de la difektita estas tuteca, unueca, harmonia. Sed ne estas postulata nur la materia harmonio, sed la kuracistoj kaj psikologistoj hodiaŭ vokas pri vivharmonio, pri akordo kaj unueco inter la tempo, kiun la homo dediĉas al laboro, ripozo, dormo, edukiĝo. Same tiel oni vokas pri la harmonio en la interhomaj rilatoj. Se ni rigardas la Virgulinon Maria kiel la patri-

non virgan, ni perceptas Ŝin kompreneble en ŝia nedifektita virgeco, sed Ŝi krom tio estis ankoraŭ harmonia estulo. La virino, kiu sukcesis kunigi la vivon, kiel oni hodiaŭ malĝuste diras, ordinara, kiu havis zorgon pri la infano, pri la edzo, pri la funkciado de la hejmmastrumado kun la vivo spirita. Ŝi estis egaligita harmonia estulo en tio, ke Ŝi havis ne nur malfermitajn orelojn por la bezonoj de tiuj, kiuj estis ĉirkaŭ Ŝi, ni rememoru la edziĝfeston en Kana Galilea, Ŝi havis malfermitan ankaŭ internan aŭdpovon por la Dia vokado. Ŝi vivis sur ĉi tiu tero, iradis sur ĉi tiu tero, kaj malgraŭ tio Ŝi vivis la vivon, kiu ĉi tiun teron ege superpaŝadis. En tio estas sendifekteco de la vivstilo de la Virgolino Maria por ni la kristanoj modela.

Pastro Kentenich ie sin esprimis, ke la ideale estas havi la manon sur la pulso de la tempo kaj la orelon sur la koro de Dio. Esti siamaniere zorganta Marta, laborema, zorganta pri la surteraj aferoj, sed samtempe ankaŭ la aŭskultanta Maria, ŝia fratino. Kunigi en unuon tiujn du reciproke sin kompletigantajn kaj la homon harmonigantajn vivstilojn. En tio estas por ni la Virgolino Maria modelo. Esti malfermita por bezonoj de ĉi tiu tempo. Vivi tiun ĉi vivon kvazaŭ inter la galileaj geedziĝaj festenanoj je la unua flanko kaj samtempe respondadi – fariĝu al mi via volo, Sinjoro, – kaj je la dua flanko, kiam ni aŭskultadas per nia interna aŭdpovo la Diajn alvokojn.

Se ni tiel estos egaligitaj, ni proksimiĝas al la vivstilo de Maria.

Max Kaŝpariŭ, Ĉeĥa IKUE-Sekcio



Vojaĝo sub la signo de la repaciĝo, de la ekumena dialogo kaj de la proksimeco al rifuĝintoj. Papo Francisko kaptis la okazon de la ĝenerala aŭdienco de la 3-a de Decembro por retrairi sian 3-tagan viziton de Turkio.

LA PAPO PRI SIA VOJAĜO AL TURKIO (28-30/11/2014)

Post danko al tiuj, kiuj laboris, por ke la vizito havu sukceson, Francisko memorigis la vojaĝojn de siaj antaŭuloj al Turkio: Paŭlo la 6-a, Johano Paŭlo la 2-a kaj Benedikto la 16-a. Kaj li menciis ankaŭ la rolon, kiun Johano la 23-a havis, kiam li estis papa delegito en Turkio. “Temas,” diris la Papo, “pri tero kara al ĉiu kristano, ĉar tie naskiĝis sankta Paŭlo, ĉar ĝi gastigis la unuajn 7 Konciliojn, kaj pro la ĉeesto apud Efezo de la domo de Maria: la tradicio diras al ni, ke tie vivis la Dipatrino post la alveno de la sankta Spirito”.

Francisko krome evidentigis, ke kun la aŭtoritatuloj de tiu lando el islama plimulto, sed kun konstitucio, kiu certigas la laikecon de la Ŝtato, li parolis pri la problemo de perforto: “Ĝuste la forgeso de Dio, ne glorado al Li, generas perforton: pro tio mi insistis pri la graveco, ke kristanoj kaj islamanoj kune sindevigu por la solidareco, la paco kaj justeco deklarante, ke ĉiu Ŝtato devas certigi al la civitanoj kaj religiaj komunumoj realan kultoliberecon”.

Poste la Papo memorigis sian viziton al

kelkaj simbolaj lokoj de la diversaj religiaj konfesioj ĉeestantaj en Turkio. Li akcentis la ekumenan preĝalvokon al la Sankta Spirito en la Katedralo de Istanbul. “La popolo de Dio, laŭ la riĉeco de siaj tradicioj kaj branĉoj, estas vokata lasi sin esti gvidata de la Sankta Spirito laŭ konstanta sinteno de malfermiteco, obeemo kaj mildeco”.

“Nia irado de ekumena dialogo estas ankaŭ irado de nia unueco, de nia katolika Eklezio: tiu, kiu faras ĉion estas la Sankta Spirito. Al ni apartenas la tasko lasi, ke Li faru, akcepti Lin kaj sekvi Liajn inspirojn”.

Pri sia renkonto kun la ekumena Patriarko de Konstantinopolo en la festo de sankta Andreo Francisko diris: “Kun Bartolomeo la 1-a ni renovigis la reciprokajn sindevigojn daŭrigi laŭ la vojo al la restarigo de la plena unueco inter katolikoj kaj ortodoksuloj. Kune ni subskribis deklaron, kiu estas plia etapo de ĉi tiu irado”.

Krome Francisko memorigis la kortuŝan kaj historian benon, kiun interŝanĝis la Patriarko de Konstantinopolo kaj la Episkopo de Romo fine de la ekumena preĝado.

Eksterprograma evento, kiu estas kompleta programo. Papo Bergoglio petis al Bartolomeo “la komplezon beni min kaj la Eklezion de Romo”. Li poste kliniĝis fronte al la Patriarko, kiu kisis lin sur la kapo kaj ĉirkaŭbrakis lin per granda spirito de frateco, en etoso el reciproka kortuŝiĝo, kun la klopodo de Bartolomeo kisi la manon de la Papo. Kiel fratoj.

Kiel Simono Petro kaj Andreo.





Papo Francisko kun patriarko Bartolomeo

La Papo daŭrigis adresante sian penson al la lasta renkonto, kiun li difinis “bela kaj dolorplena”. Temis pri la renkonto kun la geknaboj – rifuĝintoj, gastigataj de la salezanoj. “Tre gravis por mi,” diris ĉi-koncerne

Francisko, “renkonti kelkajn rifuĝintojn el la milit-regionoj de Proksima Oriento, ĉu por esprimi al ili la proksimecon mian kaj de la Eklezio, ĉu por substreki la valoron de la akceptemo, je kiu ankaŭ Turkio tre sindevigis. Plian fojon mi dankas Turkion pro ĉi tiu akcepto de multaj rifuĝintoj, kaj mi elkore dankas la salezanojn de Istanbulo”.

Fine, la Papo preĝis por ĉiuj rifuĝintoj, por ke oni forigu la motivojn de ĉi tiu dolorplena plago kaj li petis preĝon por Turkio: “Karaj fratoj kaj fratinoj, la Ĉiopova kaj Mizerikorda Dio daŭre protektu la turkan popolon, ĝiajn regantojn kaj la reprezentantojn de la diversaj religioj. Ke ili povu konstrui kune estontecon de paco tiel, ke Turkio povu reprezenti lokon de paca kunvivado inter diversaj religioj kaj kulturoj”.

PREĜO AL SANKTA PIO LA 10-a



Ho, sankta papo Pio la Deko, bona kaj viglanta paŝtisto, Vi, kiu atingis la gloron de la sanktuloj, aŭskultu la petegon, kiun ni konfide adresas al Vi. Helpu, ke ni konu pli kaj pli bone la Sinjoron Jesuon, kaj ke ni amu Lin profunde tiel, ke ni vivu por Li kaj per Li. Savogardu nin kontraŭ ĉiu malbono de l' animo kaj de l' korpo. Helpu nin vivi kiel aŭtentikaj atestantoj de la amo de Dio por la gefratoj. Protektu la tutan Eklezion, nian diocezon, nian paroĥon, la familiojn. Igu, ke ni imitu vian grandan devotecon al la beata Virgulino Maria, nia ĉiela Patrino. Via protekto atingu ankaŭ ĉiujn civilajn instituciojn kaj tiujn, kiuj aktivas en la socia vivo. Igu nin konstantaj agantoj de la paco inter ni kaj en la socio. Amen.

Ho, sankta papo Pio la Deko, bona kaj viglanta paŝtisto, Vi, kiu atingis la gloron de la sanktuloj, aŭskultu la petegon, kiun ni prezentas ĉe viaj piedoj. Akiru por ni la veran amon al Jesuo tiel, ke ni vivu nur en Li! Ni preĝpetegas por ni vian grandan devotecon al la beata Virgulino Maria, kaj ke ni liberiĝu disde ĉiu malbono de la animo kaj de la korpo! Kaj igu, ke la Eklezio kaj la kristana socio – samkiel Vi tion deziris – kantu la himnon de la venko kaj la paco. Amen.

Sankta Pio la Deko, patrono de IKUE, propetu por ĝi kaj elpetu por ĝi benon!

Kristnaska Mesaĝo 2014 de la Papo

LA INFANOJ, VIKTIMOJ DE LA NUNEPOKAJ HERODOJ

Jesuo ŝanĝu la indiferenton al proksimeco, la malakcepton al akcepto: ĝi estis la preĝo de Papo Francisko dum la kristnaska saluto Urbi et Orbi, en kiu li memorigis la larmojn de multaj en la mondo: la viktimoj de “militoj, persekutoj, sklavecoj”. Aparte li parolis pri la infanoj “viktimoj de la nunepokaj Herodoj”. Li redenuncis la komplikajn silenton de multaj kaj la globalizadon de indiferento. La Filo de Dio estas la savo, diris Francisko, preĝante por ke Li “forprenu la malmolecon el la koroj de tiom da viroj kaj virinoj”. La Papo parolis al pli ol 80.000 personoj aringintaj en placo Sankta Petro en Vatikano kaj al la milionoj, kiuj spektis la televidan elsendon. Jen lia mesaĝo.



Karaj fratoj kaj fratinoj, bonan Kristnaskon!

Jesuo, la Filo de Dio, la Savanto de la mondo, naskiĝis por ni. Li naskiĝis en Betlehemo el virgulino, realigante la malnovajn profetaĵojn. La virgulino nomiĝas Maria, ŝia edzo Jozefo.

Ili estas la personoj humilaj, plenaj je espero en la boneco de Dio, tiuj, kiuj akceptas Jesuon kaj rekonas Lin. Tiel la Sankta Spirito prilumis la paŝtistojn de Betlehemo, kiuj alkuris al la groto kaj adorkliniĝis al la Infano. Kaj poste la Spirito gvidis la maljunajn Simeon kaj Anna en la templo de Jerusalemo, kaj ili rekonis en

Jesuo la Mesion. «Miaj okuloj vidis vian savon», ekkrias Simeon, «savon preparitan [de Dio] antaŭ ĉiuj popoloj» (Luk 2,30).

Jes, gefratoj, Jesuo estas la savo por ĉiu persono kaj por ĉiu popolo!

Al Li, Savanto de la mondo, mi petas ke Li alrigardu niajn fratojn kaj fratinojn de Irako kaj de Sirio, kiuj de tro longa tempo trasuferas la efikojn de la okazanta milito, kaj kune kun aliaj etnaj kaj religiaj grupoj estas trafataj de sovaĝa persekuto. Kristnasko alportu al ili esperon, samkiel al la multnombraj elhejmigitoj, forkurintoj kaj rifuĝintoj, infanoj, plenkreskuloj kaj maljunuloj de tiu Regiono kaj de la tuta mondo. Li ŝanĝu la indiferenton al proksimeco kaj la malakcepton al akcepto, por ke tiuj, kiuj nun estas en la provo, povu ricevi la necesajn humanecajn helpojn por pretervivi je la frosto de la vin-



tro, reveni al siaj landoj kaj vivi digne. Povu la Sinjoro malfermi la korojn al la konfido

kaj donaci la pacon al la tuta Meza Oriento, ekde la Lando benita de lia naskiĝo, subtenante la strebojn de tiuj, kiuj konkrete sindevigas por la dialogo inter Israelanoj kaj Palestinanoj.



Jesuo, Savanto de la mondo, alrigardu tiujn, kiuj suferas en Ukrainio kaj konsentu al tiu amata Lando superi la streĉitecojn, venki la malamon kaj la perforton kaj ekiri novan vojon de frateco kaj repaciĝo.

Kristo Savanto, donu pacon al Niĝerio, kie plia sango estas verŝata kaj tro multaj personoj estas maljuste forprenataj disde siaj amemoj kaj tenataj kiel garantiuloj aŭ buĉataj. Pacon mi petegas ankaŭ por aliaj partoj de la afrika kontinento. Mi pensas aparte pri Libio, pri Suda Sudano, pri Centrafrika Respubliko kaj diversaj regionoj de Demokrata Respubliko Kongolando; kaj mi petas de tiuj, kiuj havas politikajn respondecojn, sindevigi pere de dialogo por superi la malakordojn kaj konstrui daŭreman fratan kunvivadon.

Jesuo savu la tromultajn infanojn viktimojn de perforto, traktatajn kiel objekton de fikomerco kaj de homrabado, aŭ devigitajn fariĝi soldatoj; infanoj, multaj misuzataj infanoj. Li donu konsolon al la familioj de la infanoj murditaj en Pakistano pasintan semajnon. Li estu proksima al tiuj, kiuj suferas pro malsanoj, aparte al la viktimoj de Ebola-epidemia, precipe en Liberio, Sieraleono kaj Gvineo. Dum mi kore dankas tiujn, kiuj kuraĝe agadas por asisti la malsanulojn kaj

iliajn familianojn, mi renovigas premantan inviton certigi la bezonatajn asistojn kaj kuracadon.

Jesuo Infano, mia penso iras al ĉiuj infanoj hodiaŭ mortigitaj kaj mistraktataj, ĉu al tiuj, kiuj trasuferas tio antaŭ ol vidi la lumon, senigitaj je la malavara amo de siaj gepatroj kaj enterigitaj en la egoismon de kulturo, kiu ne amas la vivon; ĉu al tiuj infanoj sen hejmo pro militoj kaj persekutoj, trouzataj kaj ekspluatataj sub niaj okuloj kaj nia komplika silento; kaj al la infanoj buĉataj sub la bombadoj, ankaŭ tie, kie naskiĝis la Filo de Dio. Ankaŭ hodiaŭ ilia senpova silento krias sub la glavo de multaj Herodoj. Super ilia sango ŝvebas la ombro de la nunepokaj Herodoj.

Vere multaj larmoj estas en ĉi tiu Kristnasko, kune kun la larmoj de Jesuo Infano.

Karaj fratoj kaj fratinoj, la Sankta Spirito prilumu hodiaŭ niajn korojn, por ke ni povu rekoni en la Infano Jesuo, naskiĝinta en Betlehemo el la Virgulino Maria, la savon donacitan de Dio al ĉiu el ni, al ĉiu homo kaj al ĉiuj popoloj de la tero. La povo de Kristo, kiu estas liberigo kaj servado, sentigu sin en tiom multaj koroj, kiuj trasuferas militojn, persekutojn, sklavecojn. Per sia mildeco ĉi tiu



dia povo forprenu la malmolecon el la koroj de tiom da viroj kaj virinoj enmergiĝintaj en mondumeco kaj en indiferento. Lia elaĉeta forto transformu la armilojn al plugiloj, la detruon al kreemo, la malamon al amo kaj tenero. Tiel ni povos diri kun ĝojo: “Niaj okuloj vidis vian savon”.

Bonan Kristnaskon al ĉiuj!

Tradukis Antonio de Salvo

Por la unua fojo post pluraj jaroj, la E-paneloj ne ĉeestis en placo sankta Petro okaze de la Kristnaska beno de la Papo. Ili vidiĝis la postan tagon, la 26-an de Decembro, alportitaj de grupo de romaj esperantistoj, laŭ iniciato de d-ro Ranieri Clerici. La rekta elsendo de la itala televido montris ilin plurfoje. Dum la televid-ĵurnalo de la horo 13-a de la itala ŝtata televidstacio RAI1 (TG1) la paneloj aperis unufoje. En la vespera elsendo (horo 20-a), multe pli spektata, tri fojojn. Ankaŭ aliaj televidkanaloj montris la panelojn.



SANKTA NOKT', SILENTA NOKT'

Teksto Franz Xaver Gruber, 1818

Melodio Joseph Mohr

Moderato

1. Sank - ta nokt', si - len - ta nokt', jen an - ĝel'
 el ĉi - el, ve - nis te - ren kun ĝo - ja ra - port':
 "Di - o sa - vis vin ho - mojn de l' mort'. Glo - ro al Di - o en
 al - toj, pa - co sur ter' al ho - moj."

2. Sankta nokt', silenta nokt', / en Betlehem' sen la hejm', / Vort' de Dio fariĝis homo, / por vin gvidi al ĉieldomo. / Gloro al Dio en altoj, / paco sur ter' al homoj.
3. Sankta nokt', silenta nokt', / en la stal' ĉe la val', / zorge ĉirkaŭvindita knabet' / kuŝas pace, jen, en la kripet'. / Gloro al Dio en altoj, / paco sur ter' al homoj.
4. Sankta nokt', silenta nokt', / Maria kun sia / ĉarma knabo sur pajlo kaj fojn', / vin atendas por doni gracojn. / Gloro al Dio en altoj, / paco sur ter' al homoj.
5. Sankta nokt', silenta nokt', / iru vi do al li, / klinu vin en humila ador' / kaj donacu volonte la kor'. / Gloro al Dio en altoj, / paco sur ter' al homoj.
6. Sankta nokt', silenta nokt', / glorante, laŭdante, / la paŝtistoj do hejmen iris, / Dian pacon en kor' akiris. / Gloro al Dio en altoj, / paco sur ter' al homoj.

LA HISTORIO DE MALFELIĈA PRINCINO EN RELIGIA PENTRAĴO

La itala filatelio oficejo elektis por la tradicia jara poŝtmarko dediĉita al Kristnasko pentraĵon de Agostino Carracci (1557-1602), verŝajne pentritan en 1586.

Ĉi tiu rimarkinda verko, konservata en la Nacia Galerio de la urbo Parma (Italio), montras la Dipatrinon kun Jesuo Infano kaj 4 sanktuloj. La Virgulino mamnutras la Savanton omaĝata dekstre de sankta Cecilia, kiu tenas sur sia brako la palmon de la martiriĝo kaj libron, dum je ŝiaj piedoj aperas malgranda akordiono – simboloj, kiuj karakterizas ŝin. Tute juna kaj gaja sankta Johano kun la iloj por la bapto invitas turni la rigardon al la Mesio. Maldekstre genuiĝinta estas sankta Margareta de Antioĥio, kiu alpremas al sia brusto krucon, kaj malantaŭ ŝi estas terura drako, kiu minacas ŝin. Alte maldekstre estas sankta Benedikto kun la Biblio. La ĉeesto de sankta Margareta estas indico, kiu delikate, sed evidente sciigas, ke la pentraĵon mendis Margareta Farnese (1567-1643).

En 1581, pro politikaj konvenoj kaj per riĉega doto el oraj moneroj, la 14-jaraĝa princino edzigis la Dukon de Mantova, Vincenzo Gonzaga; la malfeliĉa geedziĝo finiĝis 2 jarojn poste: pro fizika misformaĵo la nobela edzino estis deklarita nekapabla naski filojn kaj la geedziĝo estis sekve nuligita. Ŝi do estis devigata de siaj fratoj fariĝi monaĥino en la benediktana monaĥinejo de sankta Paŭlo en Parma. Ŝi alprenis la religian nomon Maura Lucenia.

Ŝia princa statuso ebligis al ŝi ricevi nekutimajn privilegiojn, kiel la vizitojn de muzikinstruisto Giulio Cima, 20-jaraĝa, kiun ŝi konis en la kortego. Baldaŭ estiĝis klaĉaĵoj pri amindumado; la esploro tamen evidentiĝis, ke fratino Maura nur aŭskultis la kan-

tojn ludatajn de la muzikisto. Sed ĉar temis pri “profanaj” kantoj, tio sufiĉis: Cima estis enkarcerigita kaj la klaŭzura vivo de Margareta fariĝis ekstrema. Pagante monon Cima sukcesis eskapi el la karcerigo kaj translokiĝi al Mantova ĉe la kortego de familio Gonzaga.



Je ĉi tiu punkto fratino Maura petis al Carracci realigi la pentraĵon. Ne mirigas do, ke en ĝi estas emfazataj elementoj por senkulpigi la princinon: la kruela drako estas ĉiam preta ekkapti sanktan Margaretan je la ĉeesto de aliaj sanktuloj; sankta Cecilia substrekas la ĉastan amon de la princino por la muziko.

Kun la paso de la jaroj la rankoro de ŝiaj fratoj kontraŭ ŝi malkreskis kaj post rekta elpaŝo de papo Klemento la 8-a ĉe familio Farnese, multaj limigoj truditaj al la malfeliĉa princino tre mildiĝis. Elektita eĉ dek fojojn, abatino de la monaĥinejo de sankta Aleksandro en Parma fratino Maura mortis en ĝi en 1643.

LA “CIVILA” MONTARA SAVANTO

Dum preĝado de la rozario mi ofte revadas. Ankaŭ nun mi ne plu preĝas, kaj aperas al mi enmense iama vintro en Tatramontaro kun renkonto de kavaliraspekta, blondhara pola amiko, kaj la ekskurso al Zakopane reviviĝis en mia memoro.

En tiu vintro kun mia edzo ni decidiĝis ne plu iri por skiadi en Donovaly, sed ni prov-vizitos la montaron Alta Tatro. Niaj amikoj rakontis multajn belajn kaj bonajn impresojn, kaj ankaŭ ni ŝatis la polojn. Ĉio glate sukcesis ankaŭ nia loĝigo en la Sport-Hotelo. Ankaŭ la prezo estis akceptebla. La restoracio bonega. Tie deĵoris grupo da montanaj gardistoj. De tie direktas la vojo al Kuznice, kaj poste per telfero al la 1900 metrojn alta Kasprowy, kaj plu al la lagoj de Alta Tatra. Sed por miri pri ties beleco plej konvena estas somero, ĉar vintre ili estas kovritaj per glacio.

Ĉi tie ni glitadis, skiadis. La neĝo estis bonega. Ĉiam mi bedaŭris, ke mia edzo ne volis iri pli foren, sed sole iri ne estis rekomendite. Tagmeze ĝoje alskiis al ni de malantaŭe alta griza viro. Li estis sola kaj tie supre ni konatiĝis. Prezentas lin al mi mia edzo. Ili bone amikiĝis, kaj por la sekvota tago planis komunan skiprogramon.

Nia ekskurso bonege sukcesis. Mi ne enuis. La tempo rapide pasis. Agrable pasis la tagoj. Venis la 30-a de Decembro – la tago, kiun mi ne forgesos dum mi vivos. Ni skiis en la ĉirkaŭaĵo. Brilegis la suno. La aero estis purega. Tiam aperis nia pola amiko. Post reciprokaj salutoj li montris al Kasprowy, de kie kun timiga rapideco proksimiĝis grandaj nigraj nuboj. Kaj kio vintre tute ne konate, la ĉielon tranĉis fulmo. Eĉ ni bone aŭdis la forajn tondrojn.

Ne estas agrable! Ek, rapide reen al nia restadejo! Ankaŭ ceteraj skiantoj rimarkis la proksimiĝantan danĝeron. Kaj atentante unu la alian la tuta kompanio ekiris malsupren de

sur la monto.

Sed la uragano tiel rapide alvenis, ke multaj ne plu povis antaŭeniri, tial nia restadejo tute plenŝtopiĝis. Ankaŭ nia pola amiko ĉi tie trovis rifuĝejon, kaj sidiĝis al nia tablo mendinte varmegan teon.

Baldaŭ oni alarmis montarajn savantojn. Unu turista grupo malliberiĝis supre ĉe la lagoj. Bonŝanĉe en la proksimeco ili trovis alarmilan telefonon. Infanoj, plenkreskuloj, ok personoj petis la helpon. Tri montaraj savantoj tuj ekiris.

Dumtempe la uragano furiozis. Dense falegis ne la pluvo, sed la neĝo. Nun denove eksonoris la helptelefono. Slovaka familio el Besztercebánya petas helpon. Ili nun estas ie en kabano sur la vojo kondukanta al Kasprowy kun du infanoj. Bonŝanĉe ankaŭ tiu loko estas ekipita per helptelefono. Sed nun estis granda problemo. La montaraj savantoj ankoraŭ ne revenis. El inter ili nur unu estas en hotelo. Li sola ne rajtas ekiri, kaj tiel li nur povis repondi al la geedzoj: eltenu trankvile.

Dramaj minutoj. Mia edzo kaj la pola amiko parolas vikle kun la montara savanto. Edzo venas al mi. Ni iros por helpi la familion. Vi preĝu por ni! Ne timu, ni revenos kaj ni alkondukos la familion kune kun ni. Ankaŭ nia pola amiko premis manon kaj diris: “Kuraĝa hungara edzino, ankaŭ vi akompanu nin per viaj preĝoj, kaj tiel ni estos kvarope”. Tiam ili bone sin vestis, sur la kapon la ŝirmkaskon kun radioaparato, por ke en la ventego ili povu interparoli. Per ŝnuro ili certige ligis sin unu al la alia.

Ili devis rapidi, ĉar hidrargo en la termometro rapide malaltiĝis. Estis danĝero, ke la infanoj tute malvarmiĝos. Unua en la vico estis la montara savanto, la dua mia edzo kaj la tria estis nia pola amiko.

Ili foriris. Mi komencis preĝi kaj ankaŭ aliaj, tiel ni kune preĝis la rozarion. Mi hun-

gare, pluraj pole, mi aŭdis ankaŭ germanajn vortojn. Ĉiuj en sia propra lingvo. Apartajn preĝojn Saluton Maria mi nombris per fingroj, kaj mi rimarkis, ke mi en ĉiun rozarian dekonajon metas ĉiam la saman misteron: “Kiun vi, sankta Maria, en la templo trovis”.

Dum la tuta tempo mi timis, ke ili ne trovos tiujn, pro kiuj ili foriris, aŭ ke ili ne povos reveni. Intertempe la vento kvietiĝis, ankaŭ nur iomete neĝis. Ĉesis la fulmotondro. La tempo kvazaŭ senfina... La unua grupo de la montarsavantoj jam bonŝance revenis kun turistoj, kiam eksonis la telefono anoncante, ke ankaŭ la niaj ektrovis la familion kaj jam retroekiris.

Iumomente malfermiĝis la pordo kaj kiel unua enpaŝis nia pola amiko portante la du infanojn, poste mia edzo alkondukis viron kaj la montara savanto apogantan kaj ŝokitan edzinon. Oni tuj komencis prizorgi ilin. La gastoj ĉiuj laŭte ekĝojegis! Ĉiuj volis premi la manojn de la “civilaj montaraj savantoj”. Sed ili tute elĉerpiĝintaj sidiĝis, por ripozi kaj refreŝiĝi per varma teo.

La ventego ĉesis kaj nur silente neĝis. La pola amiko sin preparis por foriro al sia hotelo, li brakumis por adiaŭo mian edzon kaj kisis lin. Li premis mian manon dirante: “Mi gratulas al via edzo.” Poste li ankaŭ min brakumis kaj mallaŭle sufloris: “Mi dankas pro la preĝo. Ĝi multe helpis”. Post tio li foriris...

Sekvan tagon, la 31-an de decembro, la lastan tagon de la jaro, ĵus en mia nakiĝtago, nin bonvenigis brilanta suno. Eĉ postsigno ne estis el la hieraŭa tago. Nur la temperaturo de la aero estis -15° C. Intencante iri al la sankta Meso, mi petis mian edzon akompani min al la proksima preĝejo. Mi volis dankodiri al la ĉielaj Helpantoj pro la hieraŭa helpo.


Post nia alveno eksonis la sonorilo signante la meskomencon. Eniris la mesce-

lebranta pastro. Ni preskaŭ svenis pro la surprizo, ĉar li estis nia pola amiko. Do li estas pastro. Sed poste nia surprizo ankoraŭ pliigis. En la malgranda preĝejo li ekvidis kaj ekkonis nin.

Post la fino de la meso li sendis al ni la sakristianon kun invito: “La sinjoro ĉefepiskopo volonte atendas vin en malgranda apudpreĝeja turista domo por kuna matenmanĝo”.

Do, eĉ ĉefepiskopo!

Li etendante la manojn akceptas nin laŭte ridetanta kaj diranta: “Mi tre ĝuis resti sen-noma. Mi tre amuziĝis, ĉar vi eĉ ne supozis, ke mi estas pastro, ja eĉ ĉefepiskopo de Krakovo.”



Intertempe li alpaŝas al skribotablo. El tirkesto li prenas rozarion: “Dum vi preĝis la rozarion, vi preĝis por ni”. Li benis ĝin kaj donis al mi. “Por rememoro pri la hieraŭa tago! Gardu ĝin, kaj Sankta Maria elaŭdos viajn preĝojn...”.

Ekde tiam pasis jam pli ol dudek jaroj. Ĉiam estas antaŭ mi la ridetanta pastro. La nomon de Karol Wojtyła konas la tuta mondo. Li estas nia karmemora Papo, la sankta Johano Paŭlo la 2-a.

Geedza paro el Hungario

KARDINALO JAM 20 JAROJN



La 26-an de Novembro 1994 Papo Johano Paŭlo la 2-a kreis, nomumis novajn kardinalojn. Unu el ili estis ankaŭ la ĉeĥa Mons-ro Miloslav Vlk, ĉefepiskopo de Prago. Por la tiam juna Ĉeĥa Respubliko tio signifis grandan honoron kaj ĝojon. Jes, la evento okazis antaŭ 20 jaroj. Ni danku al la Sinjoro pro la dono de tiu ĉi persono, kiu en junaĝo lernis kaj eĉ instruis Esperanton kaj pli malfrue kiel ĉefepiskopo kaj kardinalo celebris Sanktajn Mesojn ankaŭ en la lingvo internacia.

Ni rememoru kelkajn vortojn de la ĉeĥa kardinalo el pasinteco, ĉiam aktualajn.

En la pasinteco ni spertis, ke ekstera libereco ne estas ĉio. Ni malkovris, kion tio signifas: “Vi, Dio, estas mia unusola bono”. En Li ni trovis nesubpremitan internan liberecon: kontraŭ timo, kontraŭ eksteraj cirkonstancoj, kontraŭ deziro savi nin mem, kontraŭ fido je niaj fortoj ...

Nun ni estas ankaŭ ekstere liberaj. Sed ni povus denove iĝi sklavoj: de niaj pensoj, de roloj, kiujn ni ludas, de niaj zorgoj ... Ni povus nin mem fermi, bari, bloki en mallarĝan

horizonton de niaj diocezoj, impliki en malfacilaĵojn, kiujn ni renkontos ĉe nova evangelizado. Kontraŭe ni volas atesti, ke Kristo liberigis nin; ni ŝatus esti atestantoj de la tuta libereco de Kristo: “kiu, estante en la formo de Dio, ne rigardis kiel ŝatindaĵon la egalecon kun Dio” (Fil 2,6). Tiel Li liberigis nin: per tio Li donacis ĉion, sin mem tutan kaj totale. Li volis, ke ni niaflanke donu ĉion, “por ke la mondo kreu” (kp. Joh 17,21). Ni ĉiuj estas vokitaj same kiel Li senigi nin de ĉio, kion ni havas, por ke ni akceptu la aliajn kaj por ke ni povu donaci nin al ili.

Temas pri la unua paŝo de “evangelizado”, tiel kiel praktikis ĝin Jesuo: por ke Li povu akcepti nin – dekreti, preskribi rilaton kaj donaci al ni Dian vivon, Li senigis sin mem. La kruco montras al ni senmezuran rimedon de ĉi tiu fordon. Temas pri senfina rimedo de la senfina Dio. Kiam Li venis en la mondon, Li daŭrigis la vivon “kiel en la ĉielo”; dum Li ĉion donacis, montris al ni vivon de la Triunuo: reciprokan, veran donacadon. La Patro donacas sin plene, dum Li montras la Filon. Dio senigas sin tiel multe, ke se temas pri Li, Li povas akcepti donacon de la Filo. En tiu ĉi Dia sindonacado kaj akceptado estas la Patro kaj la Filo unuecaj en la Sankta Spirito.

Ne ekzistas unueco sen reciproka sindonacado, ne estas donacado sen sinrezigno.

Se ni volas transdoni plu la mesaĝon de la Evangelio en Eŭropo kaj en la mondo, kaj tiel atingi renkontiĝon inter “Vorto de la vivo” kaj diversaj kulturoj, ni devas unuavice evangelizi nin mem: vivi tion, kion ni volas anonci al la aliuloj. Kie tio okazas, kie kreskas reciproka unueco de sindonacado, kie oni ĉi tiun “triunan dialogon” vere vivas, tie troviĝas Dio vivanta; ĉeesto de Kristo kaj de lia Spirito estas preskaŭ evidenta.

(Laŭ lia libro REIFEZEIT - 1994)

Tradukis Jitka Skalická

En la tagoj de Kristnasko ĉiujare pluraj ĵurnaloj en Usono, sed ne nur, republikigas belegan leteron, kiu fariĝis klasikaĵo de la kristnaska tempo.



«JES, VIRĜINJA, PAĈJO KRISTNASKO EKZISTAS»

La demando: “*Is There a Santa Claus?*” (Ĉu ekzistas “Paĉjo Kristnasko?”), estis la titolo de artikolo aperinta en la eldono de la 21-a de Septembro 1897 de la usona ĵurnalo *The Sun*. Tiu artikolo, kiu entenis la respondon “*Yes, Virginia, there is a Santa Claus*” (“Jes, Virĝinja, Paĉjo Kristnasko ekzistas”), fariĝis neforviŝebla elemento de la kristnaska etoso en Usono. La diro “Jes, Virĝinja, ekzistas...”, estis kaj estas ankoraŭ uzata en la titoloj de la anglosaksaj ĵurnaloj por indiki ion, kio ekzistas aŭ estas vera, tre evidenta.

La letero de Virĝinja

En 1897 doktoro Philip O’Hanlon (Manhattan, Novjorko) aŭskultis la demandon de sia 8-jara filino Virĝinja, ĉu vere ekzistas “Paĉjo Kristnasko”. Virĝinja ekdubis pro tio, kion pri li diradis la aliaj infanoj. La patro konsilis al ŝi skribi al *The Sun*, grava tiutempa ĵurnalo kun konservativa tendenco, certigante al ŝi, ke “se tion diras *The Sun*, tiel estas”. Ŝi do skribis:

«Kara direktoro, mi estas 8-jaraĝa.

Kelkaj el miaj etaj amikoj diras, ke Paĉjo Kristnasko ne ekzistas.

*Mia paĉjo diris al mi: “Se vi vidas tion skribita en *The Sun*, tiel estas”.*


Bonvolu diri al mi la veron: ĉu ekzistas “Paĉjo Kristnasko”?

*Virginia O’Hanlon,
115 West Ninety-Fifth Street».*

La respondon verkis unu el la direktoroj de la ĵurnalo, Francis Pharcellus Church, kiu estis milita korespondanto dum la usona interna milito, spektante grandajn suferojn

kaj ĉefe la mankon de espero kaj kredo ĉe granda parto de la usona socio. Lia artikolo post preskaŭ 120 jaroj daŭre estas unu el la pli represataj artikoloj en la historio de la anglosaksaj ĵurnaloj.

Direktoro Edward P. Mitchell transdonis la leteron de la knabino al Church, unu el la veteranaj ĵurnalistoj de *The Sun*, por ke li verku respondon. Legante ĝin, onidire, li blovoŝpiris kaj aspektis koleriĝanta, ĉar



La artikolo “Jes, Virĝinja”

oni donis al li taskon tiom bagatelan. Poste per malpli ol 500 vortoj kaj finante antaŭ la limtempo Church respondis al Virĝinja, per nesubskribita artikolo.



Francis Pharcellus Church (1839-1906)

«Virĝinja, viaj amikoj eraras. Ili estis kontaĝitaj de la skeptikismo, tipa de ĉi tiu epoko, plenaj je skeptikuloj. Ili kredas je nenio, krom tio, kion ili vidas. Ili opinias, ke io ne povas ekzisti, se ĝi ne estas komprenebla por iliaj malgrandaj mensoj. Ĉiuj mensoj, Virĝinja, ĉu de la plenkreskuloj, ĉu de la infanoj, estas malgrandaj. En ĉi tiu nia granda universo la homo estas simpla insekto, formiko, laŭ intelekto, se komparata kun la senlima mondo, kiu ĉirkaŭas lin kaj kun tiu inteligenteco kapabla ekkapti la veron kaj la konon en ilia kompleteco.

Jes, Virĝinja, Paĉjo Kristnasko ekzistas. Li ekzistas tiom vere, kiom ekzistas la amo, la malavareco kaj la sindonemo kaj vi scias, ke ili abundas por doni al via vivo belecon kaj ĝojon. Ho ve, kiom malfeliĉa estus la mondo, se Paĉjo Kristnasko ne ekzistus! Ĝi estus malfeliĉa same, se ne ekzistus Virĝinjoj. Ne estus iu ajn infana fido, nek poezio, nek romantikismo por igi eltenebla nian ekzistadon. Neniun ĝojon ni havus krom tiu de la senso kaj de la vido. La eterna lumo, per kiu la infanaĝo plenigas la mondon estingiĝus.

Ne kredi je “Paĉjo Kristnasko”! Sam-

maniere oni povus ne kredi je la feinoj! Vi povas ankaŭ peti al via paĉjo, ke li dingu homojn, por rigardi la kamensuprojn antaŭnokte de Kristnasko, por kapti lin, sed ankaŭ kaze, ke neniu vidus lin, kion do tio pruvus? Neniu vidas “Paĉjo Kristnasko”-n, sed tio ne signifas, ke li ne ekzistas. La pli veraj aferoj de la mondo estas tiuj, kiujn nek infanoj nek granduloj sukcesas vidi. Ĉu vi iam vidis feinojn dancantajn en la herbejo? Kompreneble ne, sed tio ne pravas, ke ili vere ne estas tie. Neniu povas koncepti aŭ imagi ĉiujn mirindaĵojn, kiuj estas kaŝitaj aŭ nevideblaj en la mondo.

Vi povas disŝiri la tintileton de la beboj kaj vidi, kio estigas ĝian bruon interne, sed ekzistas vualo, kiu kovras la nevideblan mondon, kiun eĉ ne la plej forta viro de la mondo, nek eĉ la kunigita forto de ĉiuj fortaj viroj, kiuj iam vivis, povus disŝiri. Nur la kredo, la poezio, la fantazio, la amo, la liriko povas flankenpuŝi tiun kurtenon kaj vidi kaj bildigi la supernaturan belecon kaj gloron malantaŭ ĝi. Ĉu ĉio estas vere? Ho, Virĝinja, en la tuta mondo ekzistas nenio alia pli vera kaj daŭra.



Laura Virginia O'Hanlon Douglas (1889-1971), fotita kiam ŝi estis 70-jaraĝa

Ĉu neniu “Paĉjo Kristnasko”? Dank’ al Dio li vivas kaj vivos por ĉiam. Ankaŭ post 1000 jaroj, Virĝinja, eĉ pli bone, post dekfoje 10000 jaroj ekde nun, li daŭre feliĉigos la korojn de la infanoj».

La famo

Church mortis en 1906 kaj Virĝinja en 1971 post kariero kiel instruistino kaj lerneja direktorino en Novjorko.

Ŝi ricevadis konstante dum sia tuta vivo korespondaĵojn pri sia letero kaj ŝi, respondante al la alskribintoj, ĉiam sendis kopion de la artikolo. Okaze de intervjuo al ŝi farita dum la lastaj vivojaroj ŝi deklaris, ke la okazintaĵo modlis ŝian vivon laŭ pozitiva maniero.

La populareco de “Jes, Virĝinja” transvivis ĝiajn kreintojn. Malgraŭ tio, ke la artikolo aperis en sepa loko en la paĝo de la opinioj – post sufiĉe pli gravaj temoj kiel la politika debatado en Novjorko kaj en Konektikuto, la forto de la brita ŝiparo kaj la fervojoj inter Kanado kaj Jukon, kaj ankaŭ post komento pri la “senĉena biciklo” ĵus inventita – la korespondaĵo tuŝis multajn legantojn de *The Sun*. Ĝi eniris la historion

de ĵurnalismo, ĉar ĝi ne nur respondis pozitive al la demando de la knabineto, sed ĉar ĝi proponas kulturalan pritrakton multe pli vastan kaj profundan, kun rilato al invada “skeptikismo tipa de ĉi tiu epoko plena je skeptikuloj”.

La artikolon oni represigis ĉiujare antaŭ Kristnasko ĝis la fermo de *The Sun* en 1950.

Ankoraŭ hodiaŭ oni laŭtlegas ĝin ĉe Columbia University de Novjorko (la universitato, en kiu studis Church kaj Virĝinja) dum antaŭkristnaska ceremonio komence de decembro.

En 1932 televido NBC muzikigis ĝin kaj la interŝanĝo de leteroj inspiris ankaŭ muzikalon. Dum la jaroj oni realigis multajn desegnaĵojn, movbildojn, dokumentfilmojn, teatraĵojn, kantojn, afiŝojn kaj eĉ komercajn reklamaĵojn per la frazoj de la artikolo.

Kelkaj levis dubojn pri la aŭtoro de la letero, ĉar oni pensis, ke knabineto kiel Virĝinja ne povis aludi siajn samaĝulojn per “miaj etaj amikoj”. Tamen la originala letero – kiun oni pensis detruita de brulego – reaparis kaj fakulino aŭtentikigis ĝin en 1998.

ARMANDO ZECCHIN FURORAS EN WIKIPEDIO

Kvankam trafita kaj frapita de kancera mielomo, sur kiu nun ŝajnas efiki la kemioterapio studita kaj pretigita de medicinista teamo de Torino, la itala IKUE-ano Armando Zecchin daŭrigas nutri sian amatan ĉevaletan: lanĉi tra “wikipedio” artikolojn (voĉojn) el katolika aŭ kristana fontoj (kun foje aliroj tra filozofio kaj sciencoj kiel kemio). Je la fino de Aŭgusto 2014 la nombro de tiuj artikoloj atingis 2168 (en kiu kuŝas la laboro de 7/8 jaroj): <https://eo.wikipedia.org/wiki/Speciala%C4%B5o:Kontribuoj/Ludovica1>.

Armando skribis al gazeto Katolika Sento: “Kuriozaĵo feliĉiga! Mi centfoje, kaj ne nur mi, konstatis per taŭgigita tiea retilo, ke tiuj artikoloj estas albordigitaj (iuj pli, aliaj malpli, aliaj multe pli, aliaj neniom) 15 fojojn monate. Se iu volas distriĝi kaj amuziĝi, multipliku $15 \times 2168 = \dots$. La aritmetika rezulto estas la nombro, per kiu estas ĉiumonate “menĉiita” aliranto al perkancera morto. Ho, se ili povus esti propreĝoj por mia animo!”.



WIKIPEDIO
La libera enciklopedio

